

Kiel Ernest Naville batalis favore al la proporcia balotsistemo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-791, 1978 decembro 07, 09
http://www.esperanto-gacond.ch/radioprelegoj-mp3/Radioprelego_791_SRI_228_1978_12_07_09_Kiel_Ernest_Naville_batalis_favore_al_la_proporcia_balotsistemo.mp3

Cl.- Salutas el Svislando gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Dum kelkaj radioprelegoj ni interesiĝos pri la vivo kaj penso de la ĝeneva filozofo Ernest Naville, kies nomo estis donita al unu el la domoj de Gastejo Edmond Privat. Li estis la unua honora prezidanto de Svisa Esperanto-Societo.

A.- Ernest Naville havis la privilegion vivi dum preskaŭ tuta jarcento. Naskiĝinta en 1816, li mortis en 1909, 94-jaraĝa. Lia ĉefa malkovro estas la proporcia balot-sistemo.

Cl.- Jen kiel naskiĝis tiu malkovro. La 22-an de aŭgusto 1864 okazis en Ĝenevo politika evento, kiu havis sur Erneston Naville decidigan influon. De post revolucio okazinta en 1846 la Ĝeneva Respubliko estis seninterrompe regata de la radikala partio gvidata de vera diktatoro, kies nomo estas James Fazy. La opozicio esprimiĝis en sendependa partio, kies adeptoj ĉefe troviĝis en la popola kvartalo Saint-Gervais.

A.- La 21-an de aŭgusto 1864 okazis baloto por elekti membron de la plenuma instanco de la Ŝtato. James Pazy estis la kandidato de la radikala partio, dum la sendependa partio proponis la tre popularan financiston Arthur Chenevière. En la baloto Chenevière akiris pli da voĉoj ol Fazy. Tio signifis, ke la diktatoro estis forpelita. Sed la balota komisiono, kiu estis formita nur de radikaluloj, ne akceptis sin submeti al tiu popol-verdikto. Ĝi proklamis la nuligon de tiu baloto.

Cl.- La popolo tion ne povis akcepti. Centoj da civitanoj invadis la placon Molard por protesta kunsido kaj delegitaro estis sendita al la registaro, kiu kunsidis en la urbo-domo.

A.- Dum okazis tiu kunveno sur placo Molard, la adeptoj de Fazy perforte eniris armilejon kaj sin armis. Per kanonoj kaj pafiloj ili atakis la sendependulojn, kiuj iradis procesie en la stratoj de la urbo. Falis vunditoj kaj mortigitoj.

Cl.- Responde al tiu atako, la sendependuloj perforte atakis alian armilejon. Kaj estas per armiloj, ke ĉifoje ili devigis la registaron forlasi la urbodomon. Sed je la alvoko de la registaro, soldataro, kiu deĵoris en vilaĝo, alvenis ĝis la urbo-domo. La sendependuloj akceptis forlasi la urbo-domon kaj la armilojn. Jam la postan tagon federala armeo okupis la urbon. La federala registaro proklamis s-ron Chenevière elektita. La diktatoro James Fazy estis definitive forpelita el la registaro.

A.- Ernest Naville tre intense travivis tiujn tagojn. Denaska konservativulo, li malŝatis la perfortajn revoluciojn, ĉar li vidis en ili ĝermojn al novaj perfortaj agadoj. Cetere liaj filoj troviĝis inter la armitaj sendependuloj, kiuj volis respektigi la balot-decidon.

Cl.- Ernest Naville alvenis al la ideo, ke balot-sistemo, kiu donas reprezentadon nur al la plimulto, estas en si mem malbona kaj maljusta. Sen perdi tempon li serĉadis pli bonan sistemon.

A.- Li verkis memuaron pri la **Balotoj en Ĝenevo** kaj sendis ĝin al la federala registaro kaj al multaj politikaj gvidantoj. Kaj persone li iris viziti tiujn homojn en Lausanne, Friburg kaj Bern. En tiu memuaro Ernest Naville petas komparan studon de la balot-sistemoj en uzo en Svislando kaj la serĉadon de sistemo, kiu permesos al "ĉiu voĉo havi valoron" en la celo ke "neniu grupo da civitanoj restu sen reprezentado."

Cl.- Jam du monatojn poste Ernest Naville estis trovinta kontentigan solvon, tio dank' al artikolo, kiun li legis en radikala ĵurnalo. De nun Ernest Naville nelacigeble luktos por diskonigi la principojn de tiu sistemo, kiu ricevos la nomon **proporcia reprezentado**.

A.- Dank' al la proporcia reprezentado ne plu povas ekzisti plimulto bazita sur majoritato, kiu komplete forbalaas la malplimulton. La proporcia reprezentado signifas la finon de la du-partieco, la finon de la perfortaj agoj renovigataj ĉiujn du aŭ kvar jarojn okaze de la balotoj. Ernest Naville skribas: "Estas necese restarigi la suverenecon de la popolo pere de la vereco de la reprezentado. Ĉiuj opini-grupoj devas povi akiri reprezentantojn laŭ sia voĉa graveco."

Cl.- Sed trovinte solvon, kiu taŭgas por Ĝenevo, Ernest Naville ne kontentiĝis je nura loka agado. Li tuj vidis, ke tiu balot-sistemo povus alporti solvojn al multaj internaciaj konfliktoj, kiuj estas kaŭzataj de la subpremado de minoritatoj. Pro tio li sendis siajn verkojn ne nur al ĝenevaj kaj svisaj personecoj, sed ankaŭ al politikistoj loĝantaj ekstere de Svislando.

A.- Dum pluraj jaroj Ernest Naville forlasos ĉiujn siajn okupojn por sin plene dediĉi al la diskonigo de la principoj, kiujn li malkovris. Tiu energio estos baldaŭ rekompensata, ĉar en Svislando lia balot-sistemo inspiras novajn leĝojn kaj ĉar en eksterlando formiĝos societoj, por diskonigi tiujn unuajn rezultojn.

Cl.- Venontan semajnon ni vidos, kio fakte estas la proporcia reprezentado.

Vi aŭdis prelegon el Svislando pri la politika agado de la ĝeneva filozofo Ernest Naville la unua honora prezidanto de Svisa Esperanto-Societo. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!